# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Junio 2004 | MENSUEL/MONATA | 75-a jaro, n-ro 6 (1188)

*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem*

ISSN 1163.0442 | 5 €

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesperanto1@free.fr**




Pico della Mirandola

## *HUMANISTA FRAKCIO DE S.A.T.*



Thomas Moor







Giordano Bruno



Jan Amos Komensky




Baruch de Spinoza




Voltaire

**FONDOTA DUM LA KONGRESO EN BRATISLAVA**



Johann Gottfried Herder




Bertrand Russell

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

## El la redaktejo...



Karaj,
jam ni estas en la mezo de tiu ĉi jaro kaj nia kongreso alproksimiĝas. Estas la lasta momento por aliĝi, profiti de nia kamaradeca kaj amika SAT-etoso kaj de la interesa lando Slovakio. Do ne plu atendu sed tuj aliĝu. Tiuj kiuj ne pagis sian ĉijaran kotizon, faru nun. Tio estas grava por nia asocio.
Kiel vi vidas en tiu ĉi numero, dum la kongreso estos fondita "Humanista frakcio de SAT". Humanismo estis ĉiam unu el la ĉefaj principoj de nia Asocio kaj mi esperas ke multaj el vi aliĝos kaj aktivos kadre de tiu nova frakcio.
Ankaŭ oni kreos inan fakon de SAT sed pri tio vi jam estas informitaj. Dum la kongreso ankaŭ kunvenos nova Ĉielarka frakcio de SAT, krom la jam malnovaj kaj kutimaj frakcioj. Kiel vi vidas, oni multe laboros sed ankaŭ oni amuziĝos kaj turismos. Do, nepre valoras partopreni.

Via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.Freebox: 08.70.71.01.97
Retadreso: satesperanto1@free.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55, Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

# Reeldono de Nova PIV
## korektita kaj ĝisdatigita

La unua eldono de Nova PIV post iom da tempo elĉerpiĝos kaj ni estos devigataj reeldoni ĝin. Intertempe estas korektitaj eraroj el la unua eldono kaj la nova eldono aperos korektita kaj ĝisdatigita. Bedaŭrinde, por tiu nova eldono, nia Asocio ne disponas pri sufiĉe da mono. Pro tio ni decidis malfermi

# FONDUSON
## por reeldono de Nova PIV

Ni invitas SAT-anojn kaj ĉiujn esperantistojn kontribui al tiu fonduso kaj tiel ebligi la reeldonon de PIV. Pro nesufiĉa nombro de niaj membroj el kiuj eĉ granda parto pagas nur simbolan kotizon, la vendo de PIV grave helpas al la financa ekvilibro de nia asocio kaj ĝia normala funkciado. Esperante vian komprenemon kaj malavaran partoprenon en tiu nia entrepreno, ni anticipe dankas al ĉiuj.

La P.K. de SAT

ATENTIGO AL NIAJ USONAJ MEMBROJ

Nia landa peranto daŭre aktivas kaj vi povas kontakti lin por la kotizoj kaj aliaj informoj je la adreso:

Dan GLASS
7366 Park View Terrace
MOUNDS VIEW, MN 55112
rete: dglass1@comcast.net

### *SAT-ADRESARO EN LA RETO NUR POR MEMBROJ*

Ĵus aperis ĝisdatigita SAT-adresaro sur la TTT-paĝoj de SAT. Ĝi estas konsultebla nur por la SAT-membroj. Por atingi ĝin de la SAT-hejmpaĝo oni devas kliki sur la butonon "NUR MEMBROJ" kaj necesas koni la enirnomon kaj pasvorton. Krome ni protektis ĝin kontraŭ la uzo de serĉprogramoj. Ĉiuj SAT-membroj kiuj posedas retaliron povas peti de la SAT-oficejo tiujn du kodojn. Kaze de la demando, ĉiu bonvolu indiki sian SAT-numeron, kiu pruvas lian-ŝian membrecon. Viajn demandojn vi povas sendi per la retpoŝto al adreso : <satesperanto1@free.fr>, aŭ per ordinara poŝto. Se vi trovas erarojn aŭ deziras fari ŝanĝojn en viaj adresoj, nepre informu la Centron. Tiu ĉi adresaro estas deklarita en Francio ĉe CNIL (Nacia Centro por Informadiko kaj Libereco) kiu protektas la identecojn de individuoj, homajn rajtojn, privatan vivon kaj liberecon. Tiu ĉi adresaro estas ĉiutage ĝisdatigata.


*La PK de SAT*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

# ALVOKO
# FONDI HUMANISTAN FRAKCION EN S.A.T.

✰ *La homo estas parto de la naturo, kaj ne io al ĝi kontraŭstaranta.* **(Russell)**
✰ *Homo devas sin kompreni ne kiel izolitan unuopulon, kies tagoj estos baldaŭ elĉerpitaj, sed kiel parteton de la vivrivero, fluanta ek de la unua semo ĝis la malproksima kaj nekonata estonteco.* **(Russell)**
✰ *La naturo ne donis al la homo tutan perfektecon por kiu ĝi estas kapabla, li devas ĝin mem disvolvi.* **(Kant)**
✰ *Destino de la homo estas vivo kun (aliaj) homoj en la socio, kaj sinkultivado en ĝi per la scienco kaj arto, civiliziĝado kaj morala pliperfektiĝado.* **(Kant)**
✰ *Por ke homo bone vivu li devas havi sufiĉajn enspezojn, bonan sanon kaj laboron (kiu ne estas neinteresa), edukon kaj amikojn, li devas ĝui amon kaj havi infanojn (se li ilin deziras).* **(Russell)**
✰ *Nur danke al edukado homo estiĝas la homo.* **(Herder)**
✰ *Gvidprincipo de la klereco estas: kuraĝe uzu propran prudenton.* **(Kant)**
✰ *Elitoj subtenas kaj ekscitas mensdevojiĝojn de homoj neprudentaj por ilin misuzadi je propra utilo kaj profito.* **(Erasmo)**


Erasmo

✰ *En la koro de ĉiu homo estas enskribita granda leĝo de justeco kaj ekvilibro: kion vi ne volas ke aliaj homoj faru al vi, nek vi faru al ili.* **(Herder)**
✰ *Havu agrablan kaj ĉarman vizaĝon, digne kaj ĝentile sinkondutu kaj rilatu al aliaj homoj, viaj vortoj estu afablaj kaj veraj, estu bonvolema kaj sincera.* **(Komensk˝)**
✰ *Maljusto detruas landojn.* **(Herder)**

✰ *Grandan riĉecon oni povas nek akiri nek konservi sen peko.* **(Erasmo)**
✰ *La tuta ĉi-mondo estas nur unu komuna lando de ĉiuj homoj.* **(Erasmo)**
✰ *Granda obstaklo por la paco, klereco kaj plivastigo de la vero estas lingva ĥaoso en la homaro.* **(Komensk˝)**
✰ *Ne estas tiom malbona paco, kiu estus malpli bona ol la plej bona milito.* **(Erasmo)**
✰ *Homoj devas alkutimiĝi al toleremo kaj evitado de perforto, aŭ la (tuta) civilizo malaperos en ĝenerala degradado kaj mizero.* **(Russell)**
✰ *Se la homaro volas plilongigi sian ekzistadon, ĝi devas fari drastajn ŝanĝojn en sia pensado, sentado kaj sinkonduto.* **(Russell)**

---

Historio de la eŭropa humanismo komenciĝis en la antikva Grekujo. Ksenofono (565-473) rimarkis ke homo estas tiom la homo, kiom li posedas da intelekto. Heraklito (544-480) alvokadis samlandanojn esti liberaj de mitoj kaj apogi sin je la prudento. Anaksagoro (500-428) pro sia supozo ke la Suno estas brulvarmega maso estis suspektita kiel ateisto kaj forpelita el la lando. Zenono (490-430) diris ke ĉiuj homoj devus esti samlandanoj, amikoj kaj liberaj homoj, en la komuna por ĉiuj homoj socia ordo. Empedoklo (483-423) estis inter la unuaj, kiuj provis pruvi evoluon de ĉiuj estaĵoj el la praunuo, surbaze de agado de naturaj fortoj. Protagoro (481-411) konstatis ke "la homo estas mezurilo por ĉio", ke estas necese kontraŭstaradi diversajn opiniojn kaj ke, kvankam edukado ne estas ĉiopova, oni povas estiĝi virta pere de la lernado. Demokrito (460-370) penis kunigi scion kaj homecon. Li alvokadis samlandanojn esti moderaj kaj vivi harmonie. Sokrato (470-399) strebis atingi absolutecon de etikaj nocioj kaj substrekadis kiel la idealan - unuecon de la etika teorio kaj praktiko. Platono (428-348) konsideris ke ĉiu ano de la socia komunumo devas konscience plenigadi sian devon, kaj li provis konstrui idealan etikon. Ankaŭ Aristotelo (384-322) konsideris ke nur en la komunumo oni povas plene evolui homajn ecojn, sed por tion atingi oni devas kultivi personan virtecon. Epikuro (342-271) diris ke oni ne devas timi pro la morto, ĉar morto signifas perdon de sentoj. Humanismajn ideojn de antikvaj grekaj (=helenaj) pensuloj en praktiko grandparte realigis atena ŝtatestro Periklo (495-429), sub kiu Ateno atingis kulminon de sia potenco kaj la scienca kaj arta evoluo.

Helenaj idealoj de kultivado de spirito kaj korpo - paideia, kaj de la homamo, homeco, homeca sinkonduto - filantropia, estiĝis en la antikva Romanio unu idealo - humanitas. Cicerono (106-43) atentigis ke la virto estas valoro per si mem, sendepende de la premio aŭ la puno, kaj ke la vera leĝo estas natura, ĉiama kaj eterna, egala en Ateno kaj en Romo, egala iam kaj poste. Lukrecio (98-55) alvokadis homojn liberiĝi de mensdevojiĝoj. Seneko (4 a.K.-65 p.K.)) konsideris la homon io sankta, kaj ke ĉiuj sklavoj estas homoj, do - laŭnature - liberaj.

Kristanismo, proklamita de imperiestro Konstanteno (280-337) la privilegiita religio en la Romana imperio kaj, post ĝia disfalo iom post iom plivastiĝinta tra la tuta Eŭropo, establis la kristanan koncepton de la mondo kaj vivo kiel la dominantan dum venontaj jarcentoj. Sed laŭ kristanismo: 1) en la unua plano estas Dio kaj ne la homo, 2) virto estas rezulto de la kredo kaj fido je Dio, kaj ne de la memperfektiĝo, 3) la kritikan pensadon devas anstataŭigi studado de la Biblio, kaj precipe de la evangelioj, 4) la vero ne estas rezulto de mensa esplorado, sed ĝi estas enkorpigita en la persono de Jesuo Kristo, kaj ĝia interpretanto estas la eklezio. Klemento el Aleksandrio (150-215) starigis tezon ke filozofio ĉe helenoj kaj romianoj samkiel Torao ĉe hebreoj estis nur edukado por Kristo: la Torao kaj filozofio kuniĝas kaj finiĝas en la Nova Testamento. Tertuliano (160-220) tute malakceptis filozofion kaj vidis la solan solvon en la kredo. Gregoro el Niso (335-395) konsideris ke ĉiu homo havas du eblecojn: resti la homo tergloba aŭ estiĝi la homo ĉiela - kio estas multe pli bone; li havas liberan volon kaj estas respondeca por siaj agoj.

Sed baldaŭ Boetio (480-524) kuraĝigis en kristanismon enigi iujn valorojn de la helena-romana civilizo: li akcentis la homon, lian lokon, celon kaj sencon en la kosmo, kaj la liberan, kritikan pensadon li agnoskis la homa tasko. Eriugeno (810-877), konkludis ke Dio ne estas estaĵo el ekster la mondo, sed ke ĝi estas la mondo mem (=panteismo), kaj ke en tiu mondo la plej superan lokon havas la homo; la eternaj punoj ne ekzistas, kaj ĉio finfine estas ideala harmonio. Abelardo (1079-1142) alvokis la homon reveni al si mem, kaj Okkamo (1290-1350) atentigis ke ankaŭ pripensado de aferoj tiumondaj devas baziĝi sur principoj de la